n-ro 88

aprilo 2005

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Verku por Monato !

La revuo 'Monato' havas i.a. rubrikon pri ekonomio. Se en via lando aŭ regiono estas interesa novaĵo, via kontribuo pri tio bonvenas ĉe la redaktoro pri ekonomio, rotsaert(a)esperanto.be.

## Alvoko al kandidat-estraranoj

Legante la jarraporton, la IKEF-membroj konstatos ke vakos tri estraranaj postenoj. Mi alvokas kandidatojn por estrara funkcio sendi, plej laste meze de junio, sian kandidatiĝon kaj sinprezenton al ikef(a)telenet.be por aperigo en la julia numero de 'La Merkato'.

## Universala Kongreso en Litivio

Niaj membroj Wang, Kruzinauskas kaj Sabalys jam komencis la planadon de IKEF-aranĝoj dum la UK.

## Enhavo

Raportoj pri la jaro 2004 . . . . . . . . . . 4-9
Haveblaj IKEF-eldonoj . . . . . . . . . . 9
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . 10-11
Terminologia Forumo - Novaj adresoj de membroj . . . . . . . . . . 11
Novaj membroj - Peranto por Kroatio proponata . . . . . . . . . . 12
Nova retejo pri naturkuracado . . . . . . . . . . 12



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi **Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani. **Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

**Raportoj pri la agado de IKEF dum la jaro 2004**

Administrado

Grava atentigo al niaj membroj:

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2004 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 6-7 kaj 9 la financan raporton de IKEF por la jaro 2004, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa neta gajno de 330,20 eŭroj kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.

4. La estraranoj s-roj Franz Josef BRAUN (prezidanto, IKEF 4), Sílvio KNIESS MATES (IKEF 250), Profesoro OOBA Atsuo (IKEF 75) kaj Roland ROTSAERT (IKEF 3), ĉiuj elektitaj en 2003 dum la UK en Gotenburgo, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la Statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. S-roj Kniess Mates kaj Rotsaert pretas denove kandidatiĝi, dume s-roj Braun kaj Ooba ne plu kandidatiĝas. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de s-roj Kniess Mates kaj Rotsaert.

5. Nia Statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la raportoj pri agado kaj financo. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilnius, Litovio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu erojn 1 – 3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu eron 4 supre) okazos tie.

6. Membroj kiuj ne povas veni al Vilnius, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en venonta 'La Merkato' n-ro 89, komence de julio 2005.

La Estraro de IKEF



**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2004**

Membronombro realtiĝis

Dum la jaro 2004 la membronombro ree plialtiĝis de 109 fine de 2003 al 115 fine de 2004. La altiĝo okazis pro nove aliĝintaj membroj, precipe okaze de nia Ĝenerala Kunveno en Pekino.

La 115 membroj venas el 34 landoj, inter ili 18 el Germanio, 15 el Belgio, 13 el Ĉinio, 11 el Francio, 6 el Japanio, landoj kun la plej alta nombro. Inter ĉiuj troviĝas 7 dumvivaj membroj. La nombro de perantoj plialtiĝis al 8 (nove: Brazilo, Silvio KNIESS MATES).

Ni renovigas nian alvokon al bonstataj membroj pri 'patrona membreco', t.e. financa kontribuo al kotizhelpa subtena fondaĵo por interesataj membroj el malpli bonfartaj landoj. Per tio ni esperas gajni novajn membrojn kaj helpi iom al la evoluo de IKEF ankaŭ en tiaj landoj.

'La Merkato' regule aperis

Ankaŭ dum 2004 nia interkomunikilo „La Merkato“ regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

Terminara eldonaĵo: IKEF subtenis la "Borsa Terminaro"-n

La Terminara Sekcio de IKEF mem ne aperigis novan terminaron, sed IKEF kune kun Flandra Esperanto-Ligo kaj 'Esperanto 3000 vzw' el Leuven, Belgio, subtenis kaj promocias la eldonadon kaj disvendadon de la 'Borsa Terminaro' verkita de nia iama membro Hans Wiersch el Germanio.

Verka agado restas sur simila nivelo

La verka agado, kiu okazas precipe en 'Monato', internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, dum 2004 falis laŭ nombro de kontribuoj (19); sed bonŝance la nombro de verkantaj IKEF-membroj plialtiĝis (al 9, en la antaŭa jaro 7). Jen la 9 aŭtoroj:

S-roj Kep ENDERBY (IKEF 233), Josef MENDL (IKEF 303), MU Binghua (IKEF 213), Jiri PATERA (IKEF 276), Paul PEERAERTS (IKEF 65), Roland ROTSAERT (IKEF 3), Bo SANDELIN (IKEF 134), YAMASAKI Seiko (IKEF 43), Serge ZANDANDU NTOMONO ZOLA (IKEF 181).

Ankoraŭ ni devas konstati, ke por grandaj mondopartoj ne estas kunlaborantoj por ‘Monato’, kvankam loĝas tie IKEF-anoj. Kiu havas talenton por verkado, tiu anoncu sin al ‘Monato’ kiel verkanto (= pagata laboro). Ĉe tiu okazo, ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke ‘Monato’ rolas kiel cefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de ĝi. Enhavo, aspekto kaj cetera kvalito de tiu magazino lastatempe daŭre kaj profesiece pliboniĝis.

Plie aperis en nia interkomunikilo ‘La Merkato’ kelkaj artikoloj pri ekonomiaj temoj, i.a. aparte menciindaj ‘Internacia pakportalo en Esperanto’, intervjuo kun s-ro Manel Vinyals (IKEF 332) (LM n-ro 84, p. 17-19), ‘TSUNAMI – CUNAMO – Ĉu Esperanto povas amase krei karierojn?’ de s-ino Anne TILMONT (IKEF 330) (LM n-ro 85, aldonaĵo).

Kongresaj aranĝoj

Dum la 89-a UK en Pekino, Ĉinio, okazis je 29 julio 2004 la Ĝenerala Kunveno de IKEF kun la rekorda nombro de 107 ĉeestantaj personoj, inter tiuj 30 membroj kaj 77 interesitoj. Prezidanto BRAUN (IKEF 4) kun estraranoj profesoro OOBA Atsuo (IKEF 75) kaj s-ro WANG Tianyi (IKEF 117) kaj nia revizoro Gianfranco POLE-RANI (IKEF 12) sidis ĉe la podio.

La raporto pri la agado de IKEF kaj la financa raporto de 2003, ambaŭ prezentataj de la prezidanto, estis aprobitaj. Sekve sub gvidado de revizoro Polerani la estraro estis malŝarĝita. Polerani ankaŭ gvidis la procedon de elekto al la estraro. La estraranoj d-ro Rainer KURZ (IKEF 235) kaj s-ro WANG Tianyi estis reelektitaj por du jaroj, s-ro BRAUN – laŭ sia klarigo - por unu jaro.

Post tiuj laŭstatutaj procedoj sekvis la parto de diskutado. Ĝi estis malfermita per prelego de estrarano WANG Tianyi el siaj spertoj pri “Praktiko kaj problemoj en la esperanta komerco”. Montriĝis ke al Wang apartenas la meritoj pro la multnombra ĉeestantaro, ĉar li jam antaŭ la UK varbis inter ĉinaj esperantistaj komercistoj por partopreno en la Ĝenerala Kunveno.

Montriĝis ankaŭ ke efektive la ĉinoj plej multnombre el ĉiuj nacioj uzas la lingvon Esperanto por komercaj celoj. Ili negocas kun landoj en Afriko, orienta Eŭropo kaj aliaj landoj en Azio. Ili povus esti imitinda modelo por la aliaj IKEF-anoj.

En la diskutado estis traktata la problemo de lingvo. Wang kaj aliaj klarigis, ke en sia esperanta komerco la lingvo por kontakto kaj kontrakto estas Esperanto, sed la transportajn dokumentojn plenumas la transportaj entreprenoj en angla lingvo. S-ro Michael CWIK (IKEF 51) diferencis inter kontakto kaj kontrakto. Kontakto estu en Esperanto, sed por kontrakto kaj reklamo estas rekomendinda trilingva vortumado: nacia lingvo + angla + Esperanto, kiel ekzemple procedas nederlanda firmao.

Komercado inter komercistoj esperantistaj

En ĉiu numero de 'La Merkato' aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj. Ni aperigas ilin senpage. La nombro de tiuj (25) en 2004 estis iom sub la nivelo de la antaŭaj jaroj. Samtempe ili aperas en la 'Komerca Forumo' kaj en aparta ero de nia retpaĝaro www.ikef.org, www.ikef.info kaj www.ikef.net .

Instigon al komercado per Esperanto donas ankaŭ la Yahoo-retlisto per-esperanto-komerco-informoj, kiun administradas nia brazila membro s-ro Fabrício VALLE (IKEF 325) kaj la retejo www.komerco.com de nia ĉina peranto kaj estrarano WANG Tianyi. Per tio kiel ankaŭ per retpoŝto la komunikado inter la komercistoj bone funkcias. Aparte niaj ĉinaj membroj multe komercas kaj komunikas kun samideanoj en aliaj mondopartoj.

Aliaj temoj

En la estraro okazis diskuto pri nova organizado de la membraradministrado helpe de interreto, same pri la ebleco dissendi 'La Merkato'-n nur tra la reto, do ne plu en papera formo, kio havus la sekvon de malpli alta kotizo. Ĝis nun ni ne trovis unuaniman konsenton.

Resumo

Ankaŭ en 2004 ni konstatis regreson de niaj agadoj. Multaj membroj ne partoprenas en celtrafaj agadoj (laŭ nia statuto kaj laborplano), kvankam la nuntempa retpoŝta komunikado helpas sen tro da kostoj al komunaj agadoj.

Ni uzas tiun okazon por alvoko al ĉiuj membroj por partopreno en iu praktika celtrafa agado por plenumi nian ĝeneralan celon, nome akceptigi kaj plivastigi Esperanton per praktika uzado.

Por la Estraro: Franz Josef BRAUN, Prezidanto

**Financaj raporto pri la jaro 2004**

La spezokonto (rigardu ĝin je la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo) montras pozitivan saldon (330,20 EUR) per kio pligrandiĝos la IKEF-kapitalo.

Malgraŭ tio, la bildo ne estas pozitiva, ĉar pasintjare denove estis neniu projekto realigita, eĉ ne planita (kvankam estis propono por eldono/traduko de en multaj landoj urĝe bezonataj kurslibroj, sed venis neniu reago al ĝi). Kapitalo do estas je dispono de iniciatantoj.

Eĉ pli maltrankviliga estas la falo de membrokotizoj. Tio korespondas kun la falo de la membronombro dum la pasintaj jaroj, sed la kasisto ankaŭ konstatis ke iuj membroj-komercistoj el 'riĉaj' landoj nur pene, post pluraj memorigoj pagas sian kotizon, dum multaj membroj el 'malriĉaj' landoj tre akurate plilongigas sian membrecon (kaj eĉ pardonpetas se estas ioma malfruo).

Kroma grava enspezfonto de IKEF povus esti la makleraĵo pro reklamoj varbitaj por la revuo ‘Monato’ (anoncontoj kaj varbontoj trovos la tarifojn je http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php kaj petu teknikajn detalojn de monato(a)fel.esperanto.be), sed tiu ero de la spezokonto jam de jaroj montras nulan saldon.

Roland ROTSAERT, financa konsilanto de IKEF

**Haveblaj IKEF-eldonoj**, distribuitaj de Flandra Esperanto-Ligo (FEL, http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php):

Inkotermoj (19 EUR)
Dokumentaj Kreditoj (9 EUR)
Borsa Terminaro (9 EUR)
Sindikata Terminaro (4 EUR)



**Komercaj petoj kaj proponoj**

*IKEF volonte aperigas la ricevitajn anoncojn en 'La Merkato'. Tamen, plejofte mankas la plej bazaj informoj.*

*Por havi sukceson, necesas en anonco minimume mencii kompletajn kontak-tinformojn: nomo de la firmo, nomo de la kontaktpersono, poŝtadreso, telefono, fakso, retadreso, kaj eventuale retpaĝaro.*

*Krome povas utili mencii liverkondiĉojn (FOB, CIF, ... + loko) kaj pagkondiĉ-ojn (ekzemple dokumenta kredito).*

Bulgario

Je 14-23 aprilo 2005 en Sofio estos ekspozicio de bulgaraj produktantoj kaj en la komenco de monato de majo okazos Printempa Internacia Foiro en urbo Plovdiv. Se ni havos eblecon ricevi budon senpage aŭ je malaltnivela prezo, ni prezentos esperantan komercon. Estos interese proponi por niaj eksterlandaj vizitantoj iajn ofertojn ekz.:
Produktojn por la natura petrolo (el Rusio kaj aliaj ekssovetiaj landoj), diversajn metalojn, inter ili rarajn metalojn, k.t.p.

Lasto Nikov, UPIEK, Sofio, lasto11(a)yahoo.co.uk.

Ĉinio

Ĉinaj esperantistoj/**programistoj** volas servi por tiuj, kiuj deziras aldoni al sia retejo ĉin-lingvan paĝon. Ni petas alilandajn esperantistojn por montri niajn servojn, kontakti konatajn kompaniojn, entreprenojn kaj organizojn. Ni kredas ke la servo havas merkaton, ĉar la ĉina lingvo estas uzata de pli ol 1,3 miliardoj. Kontaktu kun ĉina peranto de IKEF, rete: komerco(a)public.xa.sn.cn aŭ esp(a)pub.xaonline.com.

Ni povas eksporti **karbon** al Koreio.
Interesitoj kontaktu Semio-n, semio1(a)sohu.com.

Mozambiko

*(Ripeto de teksto kiu aperis en LM 82. La helpo daŭre estas bezonata. Por povi realigi diversajn aliajn projekton, krome estas bezonata kredito je 10.000 eŭroj.)*

Por afrika projekto de sociala ekonomio (pentrado) estas serĉataj jenaj materialoj:

- kolorŝmiradoj
- skatolopenikoj
- blankaj ŝtofoj
- rismo da paperoj
- matematikaj skatoloj
- krajonoj
- gumoj
- planketoj, ktp.

Sendu al: ASSANIU BINDUKU Sirilo, Maratane Rifuĝejo, KLU-LU-P - MOCAMBIKO, c/o UNHCR/ACNUR, P.O.Box 173, NAMPULA, Moçambique.

**Terminologia Forumo en Vilno**

Kutime dum la kongresoj okazas aranĝo dediĉita al la spertinterŝanĝo inter homoj, kiuj verkis/verkas fakvortarojn aŭ alimaniere okupiĝas pri problemoj de la evoluigo de la faka lingvo en Esperanto, aparte pri problemoj de kreado de bonkvalitaj terminologioj. Ankaŭ dum la ĉi-jara UK en Vilno okazos simila aranĝo: la Terminologia Forumo.

Ĝi i.a. ebligu al kolegoj,
- informi pri verkitaj fakvortaroj kaj pri la problemoj spertitaj dum la verkado,
- informi pri planataj aŭ prilaborataj projektoj kaj eventuale varbi kunlaborantojn,
- diskuti la lastajn klopodojn refunkciigi Terminologian Centron de UEA (TEC).

Kontribuontoj sin direktu al la organizanto, Detlev Blanke, dblanke.gil(a)snafu.de.

**Novaj adresoj**

42. S-ro Mensah B.A. AGBEMADON, B.P. 12341, Lomé, Togolando
279. S-ro Bruno FLOCHON, 6, rue P.Rueff, FR-67800 BISCHHEIM, Francio



**Novaj membroj**

339. Hao Jinĝiang, ˚1941, emerita inĝeniero pri ekspertizo de la mineralo, Hubei Novepoka Grupo de Minerala Afero. Privata adreso: Zhongshan Dadao, Tongfeng-li 12 hao 201 shi, CN-430014 Wuhan, Hubei-Provinco, Ĉinio; telefono: +86-27-61240383, telefakso: +86-27-82858129, mobila :+86-13007156136.
Proponataj servoj: Informo pri mineraloj en Hubei-Provinco, Ĉinio.

340. D-ro Zlatko HINŠT, Brkljačićeva 6, HR-1000 ZAGREB, Kroatio, zlatko.hinst@hznet.hr

341. S-ro Rolandas STRAMKAUSKAS - Firmao ARASTRA (importas fruktojn kaj legomojn en Litovion kaj vendas ilin al litovaj komercistoj aŭ reeksportas)
Adreso: str. Mokyklos 24, LT-65487 VARESNA, Litovio, tel. +370-603 30195, +370-613 93096, info.arastra(a)one.lt; veikla(a)voila.fr, fakso +370-310 40533.

**Peranto por Kroatio proponata**

S-ro Vjekoslav Morankić (IKEF 217, Esperanto Societo Rijeka, Moresko Komerco) deziras iĝi IKEF-peranto por Kroatio. Komforme al la regularo por perantoj, aprobita dum la 80a UK en Tampere, 1995, la prezidanto kaj la kasisto proponas lian nomumon. La nomumo iĝos definitiva se neniu malaprobos ĝin ene de tri monatoj post aperigo de ĉi tiu anonco.

Roland Rotsaert, kasisto

**La retejo www.naturkuracado.info instalita!**

La informejo pri naturkuracado de natukuracisto Harald Schicke, Germanio, startas kun 504 paĝoj. Tiel ĝi supozeble jam estas la plej granda retejo pri naturkuracado en Esperantujo. La celo estas kolekti ĉiujn informojn pri naturkuracado en Esperanto. Ni petas vin viziti la retejon, kontribui per artikoloj kaj kontribuoj al nia forumo.

Harald Schicke, MZVerlag(a)web.de